1947/2
725
1.7.1984

# NI SALUTAS *al*

# BERNO kaj AARHUS

## KIE OKAZOS LA 32A UNIVERSALA KONGRESO, LABORISTA KONGRESO KAJ KONGRESO DE LA TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO.

★

EN JULIO-AŬGUSTO LA INTERNACIAJ ESPERANTISTOJ DENOVE KUNFESTOS SIAN MOVADON EN PACA TEMPO!... NI KORE KAJ TRE VARME SALUTAS VIN, NIAJ KARAJ GEFRATOJ KAJ GEKOLEGOJ; MALGRAŬ KE VERŜAJNE NENIU EL LA ĈINAJ ESPERANTISTOJ FORVETUROS EL LA LANDO POR VIN KUNIĜI, NI JA KUNIĜOS VIN SENTE KAJ MOVADE.

NI PASIGIS LONGAN TEMPON DE L' MILITAJ TERURAĴOJ, HODIAŬ NI DEZIRAS NUR PACON, NUR VIVON KONSTRUAN, SED ĈION DETRUAN FOR!

KIO DO ESTOS KUN NIA AFERO EN TIU NOVA TEMPO? ĈU POR ĈIAM BATALO INTER LA NEŬTRALISMO KAJ SENNEŬTRALISMO? ĈU POR ĈIAM DIVERĜOJ INTER NI?

NE ĈIAM NEŬTRALISTO KUN LA NEŬTRALA MOVADO, KAJ NE ĈIAM SENNACISTO KUN LA MOVADO SAT-A! TRE MULTAJ S.A.T.ANOJ KUNHELPIS LA ĈINAN POPOLON EN ĜIA REZISTO KONTRAŬ LA JAPANA IMPERIALISMO. KAJ EN I.E.L.-ORGANO NI LEGIS, ANTAŬ NELONGE, DISPUTOJN PRI LA NEŬTRALISMO MEM.

LA PASINTA MILITO INSTRUIS: KIE REĜIS FAŜISMO, TIE REGIS MILITA DETRUO, KAJ ESPERANTO SUFERIS EKSTERMON. AŬ SE IE EN LA «AKSAJ LANDOJ» ANKORAŬ VIVIS LA MOVADO, KIEL PALE ĜI VIVIS! ESTANTE PACA MOVADO ĜI NE KURAĜU POSTULI PACON! ESTANTE MOVADO DE INTERNACIA EGALECO ĜI TOLERU GENTMALAMON KAJ IMPERIALISMON! KAJ FINFINE TUTE SIMPLE: PLI DA EKSTERMO, PLI DA DETRUO, ĜIS TUTE DISFALUS IA AJN EBLA BAZO POR ESPERANTO...... KAJ KONTRAŬE: KIE MALFORTIĜIS AŬ TUTE MALAPERIS FAŜISMO, TIE PACO KAJ KONSTRUO EKFLORIS, KAJ VIGLE REVIVIĜIS ESP. MDO.

LA KURANTA VIVO ELOKVENTAS NE MALPLI: NI ĈERPU IOM EL LA I.E.L.ORGANO, — LASANTE LA MEZ-EŬROPON NI VIDU LA DU EKSTREMOJN: ĜIS LA KOMENCO DE MARTO, BULGARIO ELSENDIS 20560 POR-ESPERANTAJN «PETSKRIBOJN» POR U.N.O., KOMPARE KUN ĜI KION DIRUS A 263 DE HISPANIO!? HISPANIO KIE KIOM PROSPERIS LA VERDA MOVADO ANTAŬ OL FRANKO EKREGIS! KAJ SAME NIN ĈAGRENAS KE NI NE VIDIS IUN CIFERON PRI ĈINIO SUB ĈJANG KAJŜEK: MEM SUBSKRIBINTAJ KAJ ALPOŜTIGINTAJ LA PETOJN, NI NUN KONSTATAS KE NI NE SCIAS KIEN ILI TRAFIS! (HO! EVITU LA KVOMINTANGAJN CENZURISTOJN!) LA GAZETO ANTAŬ LA LEGANTOJ ESTAS ELDONITA SEKRETE! NE DEVUS ESTI TIA RILATE NIAN MOVADON SE ĈINIO ESTUS LIBERA LAŬ LA VOLO DE LA POPOLO. *(Daŭrigota sur paĝo 10)*

ĴURNALISTO. ĈINA REVUO PROVIZORE ĈIUDUMONATA. Poŝtkesto 115, ĈENGTU. Ĉinio.

2

✦ Ni sendas la gazeton kontraŭ internacia respondkupono, esperantaj libroj kaj gazetoj, aŭ diversaj valoraĵoj. Por nacia tradukado ni sendas laŭ peto. ✦

ĈU LA POSTMILITA DISVOLVIĜO DE LA MONDSITUACIO ASERTAS PRI DAŬRA PACO? NE TIOM PROSPERE!..... SINJORO CHURCHILL JAM DELONGE PLEKTADIS POR ANTISOVETIA KRUCMILITO. GENERALO FRANKO RESTAS ĈIAM PLI KURAĜIGATA. JAPANA SERPENTO, HO VE ĈINIO KIU VENENIĜIS DE ĜI!, EĈ GRASIĜAS SUB MAC-ARTHURA DEMOKRATIO. LA TIEL NOMATA DEMOKRATA USONO OFICIALE DEKLARIS SIAN KUNHELPON AL LA PLEJ PUTRAJ REGISTAROJ, NOME LA GREKA KAJ ĈJANG KAJŜEKA, POR PLIGRANDSKALE SANGIGI LA DU POPOLOJN. «ANTIKOMUNISMO» FARIĜIS TIEL PRAVIGITA KE ONI DEVUS ENTUTE FORGESI, KIEL ĜI PRAVIGIS LA MILITON LANĈITAN DE HITLER, MUSOLINI KAJ JAPANA IMPERIALISTO! KAJ NUN DENOVE LA SAMO ESTAS PREPARATA......

NE HELPAS NUR DEZIRO PRI PACO. HELPAS BATALO POR ĜI. NE IMUNAS ESPERANTA MOVADO SEN UNUIĜO DE ĈIUJ ESPERANTISTOJ SUB KORNO DE VERE POPOLA DEMOKRATIO, INTERNACIA DEMOKRATIO.

ESTAS INTERESE RIMARKI, KE LA POSTMILITA ESPERANTA MONDO NE PLU LA ANTAŬMILITAN IDENTAS. SPITE POLITIKAN NEŬTRALISMON LA NEŬTRALA RONDO JAM REKONAS SIAJN SPERTOJN KUN LA NAZIAJ FAŜISTOJ. ŜAJNAS AL LA INTERNACIA LABORISTARO, LA DUMMILITA MALFUNKCIO DE SAT-CENTRO KAJ LA RIPOZADO KAJ FORPASO DE E.LANTI SIMBOLIS CEDON DE SENNACIISMO, KIUN CETERE NE ĈIUJ SATMEMBROJ SENMODIFE AKCEPTAS. LA PROLETA INTERNACIO I.P.E. NE REFUNKCIIS ĜIS NUN. SED EN TIUJ LANDOJ KIE PLI POTENCIĜIS POSTMILITE LA POPOLAMASOJ, INKLUZIVE LABORISTARON KUN SOCIALISMA AŬ KOMUNISMA KREDO, EKZEMPLE JUGOSLAVION, BULGARION, ĈEĤOSLOVAKION K.A., EN TIUJ LANDOJ ESPERANTOMOVADO NE SOLE VIGLE PROSPERIĜAS, SED EĈ FLORAS KUN SUBTENADO DE LA DEMOKRATAJ REGANTAROJ. SPERTINTE LA MILITON KAJ FAŜISMAN TERORON, KONSCIIĜINTE PRI SIA PROPRA FORTECO, JAM ĈIUJ POPOLOJ ĈU OKCIDENTAJ ĈU ORIENTAJ IEL MALDEKSTRENIĜIS! LA ESPERANTA POPOLO NE ESTAS ESCEPTITA! ONI PAROLAS PRI SOVETIO, KIE ANTAŬ 1937 JA PLEJ BRILEGIS NIA MOVADO, SED KIAL POSTE FARIĜIS TIOM MUTA? NU, KIEL AKTIVA ESPERANTISTO LA SUBSKRIBINTO RAPORTAS, KE DUM LA ĈINA-JAPANA MILITO, INTER LA SOVETIAJ KAJ ĈINAJ ESPERANTISTOJ RECIPROKIS OFTA LETERSALUTADO ĜIS 1941, NI ESTIS INFORMITAJ PRI NOVA KURSO K.A., EĈ POST LA FALO DE SMOLENSK VENIS LETERO KUN BILDKARTO DE SMOLENSKA TEĤNIKISTO. CERTE, ĈIRKAŬ LA ANTIINVADA MILITO LA SOVETIA ESP.MOVADO SUFERIS HALTON, SED NENIO PRUVAS KE LA SOVETIA REGISTARO KUN KIEL ĈEFO STALIN, ESP.LERNINTO, ADAPTAS KONTRAŬESPERANTAN POLITIKON SAME KIEL NAZIA BANDITARO. MALE, NI POVAS ESPERI REVERDIĜON DE TIU LANDO EN UNUANIMA PACA KONSTRUADO, ĈAR EN ĜIAJ GVIDPRINCIPOJ NI VIDAS NENION KONTRAŬDIRANTAN ESPERANTON.

POVAS ESTI, KE NEK EN BERN NEK EN AARHUS LA KONGRESOJ SUFIĈE REPREZENTOS LA ĜENERALAN PERSPEKTIVON DE LA POSTMILITA DISVOLVIĜO DE ESP.MDO. ĈAR NE MATURIĜIS ĈIUJ KONDIĈOJ POR TIO. SED NI SENTAS NIN ĜOJIGITAJ KURAĜIGITAJ DE TIUJ UNUAJ POSTMILITAJ KONGRESOJ, PRECIPE DE LA ĴURNALISTA KONGRESO. ĈAR UNU AFERO ESTAS ELMONTRITA, KE LA INTERNACIAJ POPOLOJ NUN PLI OL IAM AJN KREDAS JE PACO, INTERFRATIĜO, DEMOKRATIO KAJ PROGRESADO, KAJ EN ESPERANTO ILI TROVAS ĜUSTE LA PLEJ SANKTAN PONTON AL TIUJ CELOJ.

SUKCESOJN TRE RIĈAJN! SUKCESOJN POR PLI BELA ESTONTO!

ELTUNKO, 1/VII/47.

MUZIKAMANTOJ !!!
ESPERANTA MUZIKA GAZETO APEROS!
PETU DETALOJN ĉe HENK VALCKENIER
MUZIKFAKA DELEGITO DE I.E.L.
DAENDELSSTRAAT 64. DEN HAAG
NEDERLANDO.★

EL ĈINA MUZIKO
aperis:
LA MARŜO DE L'VOLONTULOJ.
KANTO DE L'ESPERANTA FESTO.
NUN VENU AL VERDSTANDARD'.
NI SENDAS KONTRAŬ 2 Rpk.
Poŝtkesto 115, ĈENGTU. ★ĈINIO.

# ĈAN*KAJ ĈERK* kontraŭ ESPERANTO.

LA ĈINA RESPUBLIKO FONDITA DE D-RO SUN J. komence estis favora al Esperanto. Ne ankoraŭ putriĝintaj, kelkaj kvomintang-eminentuloj, Cai Yanpei, U Zxui, Shao Liz, Li Shzeng, Zhang Gi k.a. subtenis aŭ partoprenis la verdan movadon. La registaro kun Cai Yanpei kiel edukministro, ordonis enkonduki esperanton en ĉiujn instruistajn lernejojn kiel liberelektan fakon. Kiam Cai direktis la faman Pekingan Universitaton li invitis la rusan poeton Eroŝenko malfermi kurson esperantan. Fondiĝis eĉ speciala esperantolernejo en la tiama ĉefurbo Peking. En suda Ĉinio, subvenciite de la urba registaro, Kantona Esperanto-Instituto funkciis dum jaroj. Dum la nordenmarŝo de la revolucia militforto, gvidita de Dro Sun kaj partoprenita de la komunistoj (antaŭ 1927) kaj gejunuloj, laboristoj kaj kamparanoj, Kvomintango mem propagandis internacie per esperanto. Oni devas rekoni, ke en Kvomintang estis kaj eĉ nun estas kelkaj fervoraj esperantistoj, ekzemple Ŝ.M.Chun, Aŭ Sinpak, Wang Sizhou, Zhang Gingciu k.a., en favoraj cirkonstancoj ili povus ne malmulte oferi al la ĉina esperantomovado.

Sed kiam la respubliko fariĝis monarĥio de Ĉjang Kajŝek, la tiel famita «heredanto de Sun Jatsen» sed vere lia malamiko, pli kaj pli la esperantomovado sufokiĝis. Malgraŭ ke li ĉiam dankas sian regadon al la subtenado de eksterlandaj mono kaj municio, al la perfidoj kontraŭ la naciaj interesoj, li malamas ĉion «mondan» kaj «internacian», tion li akre montris en sia «Sorto de Ĉinio», deviga instrua libro por ĉiu kvomintangano. Li timas ĉiun kleran influon internacian sur la ĉina popolo. Lia registaro kaj kvomintango do estas kontraŭesperanta, neniam ili trovis bezonon pri neŭtrala internacia lingvo, ili opinias ke la angla sufiĉas por negoci kun Usono, ili praktikas devigan ĝeneralan instruadon de la angla lingvo en ĉiuj mezlernejoj kaj universitatoj.

Plurfoje la ĉina esperantistaro klopodis starigi tutlandan organizon. En 1937 la Ĉina Esperanto-Ligo, preparita de ĉiutendencaj esperantistoj, eĉ havis sian fondkongreson en Hankov, sed la ĉankajĉerka registaro rifuzis ĝin rekoni kaj registri, tio signifas ke la Ligo estis rigardata kiel nelegâ organizo kaj la registaro tute ne protektos ĝin. Pro tio la Ligo do ne povis vere funkcii. Poste en 1940 oni denove sin kuraĝigis por starigi la Ligon sed denove malsukcesis pro la sama obstaklo. Foje la kvomintang-veterano U Zxui estis vizitita, kaj li rifuzis helpi la aferon: «Ho, nun ne estas ĝusta tempo por esperantaĵo!» En 1945 oni spite ĉion starigis la Ligon, esperante ke la ĝenerala pli favora cirkonstanco, influata de la demokrata altfluso, helpos la aferon. Sed baldaŭ montriĝis ke Ĉjang reprenis sian vojon obskuran kaj dispolviĝis ĉiu plano de la Ligo, kiu poste plu ne ekzistis. Samaj spertoj kun la lokaj organizoj. Ekzemple nun oni havas rilaton kun la Ĉengtua E. Ligo, sed ĉu oni scias ke tiu Ligo ekzistadis nur duonpublike kaj nun estas persekutata? Ĉu oni scias ke por serĉi esperantistan ĵurnaliston, en sola nokto la policanoj plurfoje traserĉis ĵurnalejon?

Antaŭ la ĉina-japana milito la esperantistoj, kiuj cetere estis patriamantoj, ofte estis politike suspektataj, iliajn organizojn ofte vizitadis «tewu» (kvomintanga sekretpolico). Tewu sin anoncis por nova kurso, tewu ĉeestis vesperkunvenon, tewu aliĝis al grupo, tewu vizitis samideanon, tewu lin sekvis tra stratoj, tewu kontrolis en poŝtejo... Kaj kion la simpla verdemulo sentus en la koro? kiel oni varbu la publikon?... Foje kaj foje suspektato arestiĝis, perdiĝis! La Ŝanĥaja Esperantista Ligo ne forpremiĝis nur dank'al tio, ke ĝia sidejo troviĝis en la angla koncesio, kie la kvomintangaj ungoj ne povis rekte tuŝi!

En 1941 en Ĉungking, mem laborante en la Korespondа E.-Lernejo, la subskribinto havis okazon akcepti multajn tewu-ojn; interalie unu venis kun mondlisto de tewu-kurso sub la Militafera Komitato, kies Ĉefkomitatano estis

# KRONIKO DE LA ĈINA ĴURNALISTA MONDO

♦ PRI «TUTMONDA ESP.ISTA ĴURNALISTA ASOCIO» publikis sufiĉe detalan informon la jenaj ĉinaj ĵurnaloj: WEN WEI PAO, la plej influa demokrata tagĵurnalo en Ŝanghaj; XUASI WANBAO, la ĉiuvespera organo de la Demokrata Unuiĝo en Ĉengtu; SINSIN SINWEN, la plej malnova kaj multe eldona tagĵurnalo en Ĉengtu; ĈENGTU KUAIBAO, malnova tagĵurnalo en Ĉengtu. La informon elsendis TEĴA membroj Eltunko, Turkin kaj Linlan.

♦ ESP.ISTA ĴURNALISTO ŜAŬMO (Ding Xuichuan), redaktoro de la SHMIN RHBAO en PEJPING, leginte la informon, tuj sin turnis al la ĉina delegito de T.E.Ĵ.A. kaj aliĝis al ĝi.

♦ LEGANTOJ DE «WEN WEI PAO» tre interesiĝis je T.E.Ĵ.A. kaj esperantomovado, el diversaj provincoj sendis leterojn al ĝia ĉina delegito. Sekve de tio la nomita ŝanghaja ĵurnalo aperigis en majo publikan respondon de la delegito. Kaj denove altiris multajn novajn leterojn. Pluraj legantoj sin anoncis al la koresponda esp.kurso en Ĉengtu.

♦ ESPERANTA LETERO el Jugoslavio, ĉinigita, aperis en majo en XUASI WANBAO, Ĉengtu. Samtempe aperis ĉinigita informo pri nova radiostacio en Varsovio sendita de S-ano I. Dratwer. La ĉina delegito elsendis ankoraŭ multajn informojn elesperantigitajn, sed ĝustatempe okazis granda teroro al la ĉina ĵurnalista mondo, kaj la materialoj ne sukcesis aperi.

♦ LA KOMUNISTA ĴURNALO SIN XUA RHBAO en Ĉungking estis malpermesita de la garnizona stabo, en februara fino. En la kvomintanga regiono do plu ne estas komunista ĵurnalo.

♦ EN LA FINO DE MAJO en Ŝanghaj la garnizona komandanto ordonis malpermesi la tri multe legatajn tagĵurnalojn: TA KUNG PAO, WEN WEI PAO kaj SIN MIN PAO. Ankaŭ la verperĵurnalon LIANXO WANBAO trafis la sama bato. La nomitaj ĵurnaloj estis rigardataj kiel pli-aŭ-malpli libertendencaj. En Ĉengtu oni same malpermesis la ĉiuvesperan organon de la Demokrata Unuiĝo, XUASI WANBAO.

♦ GRANDSKALA TERORO DE ĈAN' KAJ ĈERK' komenciĝis je la unua de junio. En Ĉungking la garnizono arestis milojn da ĵurnalistoj, profesoroj, gestudentoj, laboristoj, verkistoj, aktoroj ktp. La kaŭzo estis ke ili volas demonstracii kontraŭ la internmilita politiko de Kvomintang. Arestiĝis ĵurnalistoj de TA KUNG PAO (ĉungkinga eldono), MINZHU BAO, GUOMIN GUNGBAO, SHANGWU RHBAO kaj multaj aliaj. Ĵurnalista arestado okazis ankaŭ en ĉiuj lokoj de la kvomintanga regado, sub preteksto ke oni serĉas komunistojn, sed fakte estis nur ekstermado kontraŭ ĉia ĝusta informado pri la putra regado de Kvomintang kaj pri la suferoj de la popolanoj. Senhomeca torturado kaj perforta «antikomunistiĝo» okazas. La tuta procedo iras sekrete, malleĝe. La teroro nur ĵus komenciĝis! Ĝi daŭros k. pli severiĝos......


## KIO ESTAS LA «KONSTITUCIO» DE ĈAN' KAJ ĈERK'....?

Ĉjang Kajŝek, kaj oni povis vidi veran mirindaĵon: en la listo kune kun diversaj ĉiutagaĵoj, ekzemple lavtuko, sapo, tasoj k.t.p. kaj ĥemiaĵoj (ĉu por esplori kaŝleterojn?) okulpike troviĝis libronomoj, nuraj en la listo, ili estis la lernolibroj eldonitaj de la Koresponda E-Lernejo, la mendonombro estis ĉirkaŭ ducent serioj po tri libroj. Kion do la tewukurso faris kun tiuj esperantaj lernolibroj? kaj kiu instruis la kursanojn esperante? Kion faris kun nia lingvo la ellernintoj? Poste ni ricevis neniom da informo. Sed aliflanke ĉiu esperanta eldonaĵo estis severe manuskripte cenzurata, forstrekata, elŝirata, erarigata, aŭ tute malpermesata. En Ningxia la mahometana esperantisto Xo Iao iniciatis monkolekton por esperanta eldonado, li sukcesis varbi sumon kun dekkelkaj subskribintoj, belan iniciatan alvokon al la tutlandaj verduloj ili elsendis, sed tuj sekve ili estis traserĉataj de la kvomintang-registaro kaj Xo Iao arestiĝis; malgraŭ ke fine oni eldonis la grandan Esp-Ĉinan vortaron de Venlo Fon dank'al tiu iniciato kaj la brila monkolekto, rifuĝinto el Ningxia raportis ke oni eble neniam revidos la karan mahometanan esperantiston!.....

Kaj neniu devas miri, se li informiĝis pri malpermeso al esperantista organizo, propagando, eldonado, instruado ktp. Neniu devas frostiĝi aŭdinte arestiĝon aŭ perdiĝon de simpla esperantisto. Tie kaj ĉi tie similaj aferoj ofte okazas. Eĉ kvomintangan esperantiston la ĉankajĉerka reĝimo persekutas. Oni ne povas atendi ke Ĉjang Kajŝek imitu la falsan "esperantoprotektoron" Musolini. Ne! li pli malamas esperanton ol Hitler! Kial? ĉar esence esperanto estas ligilo de la demokrata internacia popolo, dum la reĝimo de "Ĉan' Kaj Ĉerk'" parolas nur lingvon la plej nigran! —LUPID.

# JEN FRIPONEGO VI! DE SHU MO.

你这个坏东西




✦El la ĉina esperantigis ELTUNKO.✦

**ŜU MO**, unu el la plej ŝataj komponistoj de Ĉinio, muzikbatalanto sur la frontoj nacidefenda kaj demokrata, estas multe konata ankaŭ internacie per sia fama patriota kanto « Hej ho hej », adaptita en usona filmo pri la ĉina-japana milito. Liajn verkojn karakterizas riĉa popola sento kaj facila sed forta muziko. Ne multe li publikis pri purmuzikaĵo. Li servadis ĉiam al la sento kaj deziro de la popolo, neniam li indulgis la popolmalamikojn, tial de tiuj ĉi li estas ankaŭ tre malamata, foje oni informiĝis ke li estas arestita de Kvomintango, sed baldaŭ ree vigliĝis liaj kreoj.

**PRI «JEN FRIPONEGO VI»** la komponisto jene notis: « La sento de tiu kanto plenas de indigno kaj furio, ne tro rapidu, sed klare sonu ĉiu vorto, precipe atentu sur la "*f*". Estas laŭ la bontrovo de la kantgvidanto ĉu li adaptu tiun pecon por kune kanti, kondukkanti aŭ alterne kanti per vira kaj virina voĉoj. » Verko en la ĉina-japana milittempo, reprezentita en la filmo postmilita « Vojaĝo kun la Nub' kaj Lun' ». Pro la pli severiĝanta krizo kiun kaŭzas la antipopola internmilita politiko de Kvomintango tiu kanto eĉ pli potence elsonigas la indignon de la vekiĝinta popolo ĉina. La traduk.

# Sceno en Ĉina Universitato

*Notoj de la redakcio: En la pasintaj du monatoj okazis granda movado de tutlandaj gestudentoj kaj sanga teroro de la kvomintanga registaro de Ĉjang-Kajŝek. Tiu ĉi, spite de la mizerega stato de l'popola vivo, daŭrigas sian antikomunistan militon kaj antidemokratan politikon, tiel ke la lando ĉiampli dronis en profundegon de vivkrizoj. Heredante la plej brilan patriaman tradicion de la ĉina studenta movado dum tridekjaroj, la gejunuloj leviĝis por voki al paco kaj demokratio, tra la tuta majo ili vokadis kun arda amo kaj akiris ĝeneralan simpation de la popolo; ĉiuj senpartiaj ĵurnaloj, spite perfortajn premojn de la kvomintanga registaro, kiel eble plej fidele raportis pri la movado. Sed tio akre malkvietigis la sangavidan tronon de Ĉjang Kajŝek, li do ordonis teroron kontraŭ la gejunuloj kaj justamaj ĵurnalistoj, samtempe ĝeneralan ekstermadon kontraŭ ĉiuj demokratoj. Hodiaŭ en la parto de Ĉinio kiun regas Kvomintang, malfermiĝis la plej nigra, terora kaj reakcia momento de la historio. Tie ĉi ni publikas kelkajn fragmentojn el letero de nia leganto, kiu okulfrapis scenon korskuan en la ŝtata Uĥan Universitato en Wuĉang.*

*Niaj karaj legantoj! Kion vi aŭdas de la nova generacio de Ĉinio, kaj kion vi trovos por subteni kaj mildigi la junulojn en mizerego?*

HIERAŬ mi iris por kondolenci la sangtinkturitan Monton Logiashan. Sur vizaĝo de la gestudentoj estas legebla malĝoja sed majesta ĉagrenkolero. Ili varme min akceptis, kaj pri la mondfamigita juni-unua tragedio detale min informis juna studento:

## EL DORMOSONĜOJ

subite ni vekiĝis de kalkanuma bruego kaj ĉan-klakado, estis matene la tria. Pordfrapoj, minacaj krioj subdiras ke io malbona okazos. « Ne iraĉu! la patroj vin mortbatos! ...Kien? » «Al la klozeto.» « Malpermesite, rulaĉu reen!» Ĉeporde de ĉiu ĉambro gardanto pikas bajoneton antaŭ tiu kiu volus eliri, kaj la «tewu» (kvomintangaj sekretpolicanoj) traserĉas ĉiun kaj ĉion enĉambre. Ĉiu tewuano havas tri nigrajn listojn, dense liniajn, ĉiu linio kun ne malpli ol tri nomoj. Eĉ mokinda bubo neenlistigita arestiĝis, simple pro tio ke amiko sendis al li leteron kun vortoj «interna milito»! Jen unu plenigita aŭto, jen alia, jen pluaj, bruas for, bruasfor......

## SUB TAGA LUMO

malkovriĝis ankoraŭ tri ŝarĝaŭtoj ekster la knabloĝejo. Aro da ĝendarmoj, soldatoj kaj policanoj, interalie unu kun nigra masko, alia kun blanka... ankoraŭ kamaradoj ŝnuriĝas kaj portiĝas for! Kun indigno la studentoj ekkrias, sin puŝas el ĉambroj. Streĉa baraktado. El supraetaĝa lavejo verŝiĝis akvo sur la apaĉojn. Fine ili atingis ekster la loĝejo, kaj jen denova aŭtobuso de la urbdomo, plenigita de kamaradoj! Kolero tondras, la aŭtobuso estas rompita, la kamaradoj estas liberigitaj... Sed jen bajonetoj! la malantaŭe starantaj kamaradoj rapidas reteni la pafiltenilojn... Subite ekpafo! sekvis densdensaj salvoj, krakado de maŝinpafiloj...... «Haltu! sinjoro, haltigu ilin! ...» rapidkure unu studento

## GENUAS, PETEGAS

antaŭ oficiron. «Mortpafu la hundidon! » krias soldatoj levante la fusilojn. Timigite la studento forkuris. Pli arda fajro, pli densaj kugloj, minaca siblado de la morto ...... Kelkaj minutoj for...... «Ho ve, mi vundiĝas! » ie krioj. « Jen mortas......! » La komandanto ordonas nepafi. Sur la ŝtona ŝtuparo en sangmarĉo

## KUŜAS WANG ZHDE

kun krevigita kapo, kiel lak-

*«La militemuloj diboĉas pri la popola vivo, spitas la tutlandan deziron pri paco, kaj ekspluatas la lastan grenon por manĝigi sian kanonon sur internmilita fronto. Jen kial ni malsatas! For militon! La paco! la paco!»*

*——De la gestudentoj de Nankinga Universitato.*

to elgutas la cerbkaĉo........ Kaj nun rikane ekridas la komandanto: «Nu,

## TRE BONE !

vi povas nun reiri en viajn ĉambrojn!» Sed baldaŭ alian kadavron ni ekvidis: en sangmarĉo falis Chen Rhufung. En la kvara etaĝo malsana kuŝis Xuang Minggang, surprizite de la pafoj, li elrigardis kap-tra-fenestre, kaj ankaŭ lin trapafis pluraj kugloj. La buĉistoj mortigis lin de sur alia tegmento. Usona doktoro Miller kontrolis la vundojn, li certigas ke la ekzekutistoj uzis dumdumojn, venenkuglojn eĉ kontraŭ la leĝo en internaciaj militoj! Grave vundiĝis tri, interalie loĝeja administranto, tafita ankaŭ enĉambre. Aliaj vunditoj pli ol dudek. Post la krimokazaĵo la studenta komunumo ekspoziciis la kolektitajn kuglojn, krom la fusilaj kaj maŝinpafilaj kugloj estis ankaŭ teniloj kaj eksplodpecoj de mangrenadoj.

## EN STUDENTINEJO

la traserĉado kaj arestado ankoraŭ ne finis kiam ekstere ekbruis pafoj. Knabino demandis al la serĉantoj: «Kial? eĉ pafoj?» «Hm, jam

## ESTAS LA TEMPO

por tio!» Estas certigite ke en la knaba loĝejo vere pafis signalon la komandanto, la sangbuĉado okazis laŭ difinita plano. Pli ol mil policanoj, ĝendarmoj kaj soldatoj estis mobilizitaj por tio.

Miu Langshan kaj aliaj 4 profesoroj estis forportitaj en aŭto, kune arestiĝis Zhang Shki, Guo Shusheng kaj multaj aliaj studentoj...... Ho ve! kion mi travivis en mia tuta vivo dum la pasintaj tridek jaroj nenio tiel min dolorigis al la koro... Kion vi dirus vi esperantaj gekolegoj?..

MUNGXU. 6/VI/47
Ĥankov.




*Honto de la homaro estas la studentbuĉado de la Kvomintanga registaro, kiam ĝi publikis la «konstitucion», kiam la tuta popolo sopiras nur je paco kaj demokratio!*
*—Deklaracio de la studentaro de Uĥan Univ.*

◆ Pro malbona nutro en la ĉina studentaro rapide kreskis ftizo, pli ol 70% de la gestudentoj de la Centra Universitato ftizmalsaniĝis.

◆ En demonstracio antaŭ la Kvomintanga registaro:

Gestudentoj: «Malsate! malsate!»

Edukministro: «...Vi devas kompreni ke la ŝtato ĵus pasigis okjaran militon kaj la popolo vivas ekstreme mizerege...»

Gestudentoj: «Sed kial do la registaro ankoraŭ volas enlandan militadon?»

◆ «Ŝparu el la milita elspezo! Manĝigu la malsatantajn gejunulojn!» «Ne diboĉu milite, sed plibonigu la edukon!»

◆ «Ankaŭ ni ne havas sufiĉan manĝaĵon!» ĝemis soldato preteriranta.

◆ Karikaturo farita sur muro de la registara palaco: antikomunista kuglo dispecigas la manĝujon de la popolo.

◆ Sur la edukministreja pordego pentriĝis: granda kranio de skeleto.

◆ «Malsate! malsate! malsate! Ni ĉiuj kunagu gefrate! La flagon militan tuj for! Kaj glason de ŝtatan-likvor'!»

◆ «Oni kulpigas ke ni havas fonon kaj intrigon. Jes! ni havas fonon, la malsaton! Kaj ni intrigas nin manĝigi! Ni volas ŝanĝi la mortigan pulvoron en vivigan panon!»

◆ «Ni ne mortaĉos en muto, ni venkos, ĉar la tuta popolo sekvos nian krion pri la malsato!»

## GUTOJ EL MARO DE LA STUDENTAJ BATALOJ.

# NIGRAJ BATALANTOJ

## LA SALLABORISTOJ EN UTUNGKIAO

GUNG GU

MODERNA ĥemiisto enpaŝis salproduktejon en Utungkiao kaj tuj diable elkuris kriante: «Mia Dio! mia Dio! kvin-minute, mi jam mortos de tia densa $CO_2$!»

Kaj sufiĉe ridis niaj nigraj batalantoj. Kvinminute, kvinhore, kvinjare kaj eĉ pli longe ili trankvile travivis en tia densa fumego!

Simplaj laboristoj, ili scias nur labori. La vivo devigas, hejme atendas la malsatantaj gepatroj kaj geetuloj. Juneco foriris kaj la frunto sulkiĝis, malfortiĝintaj, tusantaj, sed ankoraŭ pli malboniĝos se oni malsatos senlabore; kio do indas pli ol zorgoj pri laborado!......

Aĉaj manĝaĵoj, ĉifonaj malpurigitaj vestaĵoj. Kelkaj eĉ tute sen vestaĵo, ĉirkaŭtuko ŝirmas la kokson. Vidante ilin elirantaj kun ferstango el laborejo, tiel nigraj, vi pensos ke kredeble ili ĵus sin banis en nigra inko. Tuta korpo nigrigita, sin movas okulblankoj. Kaj vi nature memoros pri la negroj en Afriko.

Certe, kiam la negrobatalantoj ensaltas arbaregon kun sia longa pikilo, ili ne povas sin kohsoli ke la sovaĝaj bestoj ne faros danĝeron al ili; sed la vivo pelas ilin antaŭen. Kaj same por niaj sallaboristoj, kun ferstango kiun ili uzas por fajrado, ili eniras kaj la vivon konsumas tie, kie $CO_2$ sufokas!

*Rimarkas la red.: Kun plezuro ni ricevis malgrandan skizon pri la sallaborista vivo en Utungkiao, kunverkita de kelkaj tiulokaj mezlernejanoj. Sed tre bedaŭrinde, okaze venis vizitanto al la redaktoro, kaj post ties foriro ni malkovris ke la meza parto de tiu skizo, sur aparta papero, estas perdigita. Sed la komenca parto jam skribiĝis sur la litografpapero, ni do ne retiros ĝin kun la fina parto. Ni dankas la verkintojn, esperante pli detalan raporton pri la sallaborista vivo.*

## KORESPONDU!

● TUTMONDA E. ĴURNALISTA ASOCIO. Värmlandsgatan 18, GÖTEBORG, Svedio.

● ĈINA DELEGITO de T.E.Ĵ.A.: ELTUNKO, Poŝtkesto 115, ĈENGTU, Ĉinio.

● LINLAN, T.E.Ĵ.A. membro, Poŝtkesto 531, NANKING, Ĉinio.

● ŜAŬMO, T.E.Ĵ.A. membro, Nan Siao Gie 67, PEJPING.

● K-do Francis GUÈ, dez. kor. kun ĉinaj kamarad(in)oj pri ordinara vivado, laborkondiĉoj, kutimoj k.t.p. Adreso: Les Haies, Dammarie sur Loing (Loiret), Francio.

● K-do Charles BLOT, 35 jara franca laboristo, dez. kor. kun ĉinaj geesp-istoj pri diversaj temoj. 17 bis. Boulevard Saint Germain, Fougères (I. et V.), Francio.

● Robert FOLLAETS, Lieven Gevaertstr. 18, Oude-God, Antwerpen, Belgio. Kun stud. aŭ instr.

## ĈINA ESP-A BIBLIOTEKO

Poŝtkesto 115, ĈENGTU, ĈINIO.

KUN DANKOJ RICEVIS DE S-ANO JOHN SPENCE, KAWEAH, CALIF., USONO:


The British Esperantist, no. 395.
Esperantobladet, no 6 de 1937.
Heroldo de Esperanto, no. 684.
" " " , no. 955.
Esperanto, UEA, no. 215-216.
" , " , no. 286.
Kristnaska Ektagiĝoj inter Montoj, folio. 2 ekz.

## DANKE NI KVITANCAS

| | "ĉ.n.k." milo |
|---|---|
| K-do Kroŝ | 140. |
| Ĉengtua Esp.-Ligo | 50. |
| K-do Laŭlum | 50. |
| S-ro Turkin | 10. |
| S-ro Ŝaŭmo | 12. |
| S-ro Zhung Dingwen | 20. |
| K-do Linlan | 10. |
| S-ro Zhou Siyng | 50. |
| K-do Fu Sienpej | 20. |
| K-do Iang Ynpei | 20. |
| K-do Zhung Mu | 20. |
| ĜIS LA 3A DE JULIO | 402. |

## KOREKTU en nia Nro 1:

«FLUGAS BIRDET'»




## KORESPONDU!

G. SELHORST, Burgm: Peecklaan 252, SCHOORL. Holando. Deziras korespondi kun studentino pri geografio, etnologio, botaniko (floroj) k.a. Interŝanĝas p. m. kaj florsemoj.